

Dankesprimio

Mia edzino, *Dr. agr. M.A.B. Stampa* kaj profesorino *Dr. agr. M. Rommel* de la Instituto pri Tropika Kultivado en *Witzenhausen*/Germanio donis al mi valoran helpon dum planado kaj realigo de la esploralaboroj. La posedanto de la farmbieno *Boplaas*, la geedzoj *J.B.* kaj *S.B.C. Burger* (*BSc. agr., Stellenbosch*) grandanime portis la dum realigo de la studoj estiĝantajn financajn perdojn. *Prof. Dr. med. vet. R. Sachs* tradukis la origine afrikanslingve verkitan manuskripton en la internacie pli vastaprofesie atingeblan internacian lingvon Esperanto. Al tiuj ĉi sinjorinoj kaj sinjoroj mi esprimas mian plej sinceran dankon.

Literaturo

Stampa S. & R. du Toit (1957). *Paralysis of stock due to the Karoo-paralysis-tick*. *Jl. S. Afr. Assoc. for Readvancement*, **54**, 241.

Stampa S. (1959). *Tick paralysis in the Karoo areas of South Africa*. *Onderstepoort Jl. of Vet. Research*, **28**, (2).

Stampa S., R. Sachs. & A. Stampa (2000). Paŝtejoj en sekaj regionoj. *Scienca Revuo*, **51** (4), 3-11.

Trollop G. (1975). Persona komunikado.

Adreso de la aŭtoro

Dr. Siegfried Stampa
Blauenstrasse 7
DE - 79410 - *Badenweiler*
GERMANIO

Priaŭtora informo

Veterinaro specialigita en parazitologio, emerita profesoro de la Universitato *Fort Hare* en Sudafriko, kun entute 30-jara praktikado en la sudafrika Kablando kaj funda kono pri la plibonigado de paŝtejoj en tropikaj regionoj.

Pli da kohereco en la scienca leksiko

Josef KAVKA

Enkonduke

Memkomprene, koherecon en ajna vivanta lingvo, tia tre subtila organismo, oni ne provu konduki ĝis absurdo. El sfero komunuza povas servi ekzemplo unusola:

Ekzistas la fundamenta netransitiva verbo embuski, france *embusquer*, itale *imboscare*, tiu tamen transitiva = enarbarigi, dum *imboscarsi* = kaŝi sin (en arbaro). Ĉio ĉi referencas al la itala *bosco* = arbar(et)o, hispana *bosque* = bosko (laŭ PIV registrita en la dua Oficiala Aldono). Absurda estas klopodo, ĉu laŭforme, ĉu laŭsence koharigi embuskon kun bosko. Enboskiĝo ja ne signifas embuskon, ĉu? Parolantoj de komunuza lingvo, poetoj k.a. restu trankvilaj.

Tute alia situacio montriĝas en la sfero scienca, pli precize en la terminologia, plej strikte en la nomenklatura. Jam plurfoje (ekz. en 1980, plej freŝdate en 1996, 1998, 2000, 2001) mi provis turni atenton al nepardoneblaj malkoherecoj en PIV, kiuj kompromitas Esperanton, t.e. planlingvon, en la okuloj de sciencistoj. Nun mi ne revenu al la jam antaŭe kritikitaj okazoj, sed alpaŝu kelkon da aliaj. Ili klare ilustru, kiom malplanlingvaj ili impresas kompare kun etnolingvoj, aparte kun la latina kaj greka, kiuj tre gravas por la sistemoj nomenklaturaj.

QU - Mi komencu per la fontolingvo latino. Laŭfundamente, la latina **QU** esperantiĝas kiel **KV**: *aqua* = akvo, *quarzum* = kvarco, *Quercus* = kverko, *siliqua* = silikvo. Sed kial la birdo *Anas querquedula* misformiĝis al la PIVa "kerkedulo"? Ĉu por esti pli belsona? Sed tia vidpunkto estas apenaŭ allasebla en nomenklatura praktiko...

I, Y - Oni vidu, kiel la latinaj vokaloj **I** kaj **Y** laŭfundamente redoniĝas en Esperanto: *Caryophyllus* = kariofilo, *Crocodylus* = krokodilo, *Gryllus* = grilo, *Vanilla* = vanilo. Sed kial la manĝebla mar-molusko *Mytilus* oficiale fariĝis "mitulo"?

U - Interese, kiel malcerta aperas en Esperanto la latina vokalo *U* de la antaŭlasta silabo: *Betula* = betulo, *Tragulus* = “tragolo”, *cuticula* “kutiklo”. Foje restas la originala *U*, foje aperas anstataŭa *O*, foje ĝi tute mankas. Simptoma estas la PIVaĵo: “rapunkolo el kampanulaĵoj”. Kiom facile estus forigi tiaspecan malordon en la botanika kaj zoologia nomaroj. Beletristo, sed ne naturhistoriisto, senzorge komfortiĝu en la “ĉarma” ĥaoso...

A - Antaŭ forlasi la latinon, mi komparu du nomojn, kiuj rilatas al la vorto *granum* = grajno.

1. **Granato** estas mineralo nomita laŭ la adjektivo *granatus* = grajnoforma, ĉar ĝi povas aperadi kiel izolita grajno. Tamen, PIV surprizas nin per la aprobo bapti la mineralon franceske: “grenato”, spite al ĝia formo internacia, kiu estas nedisigeble ligita kun la fruktarbo *Punica granatum* = puniko granata. En la senco botanika temas pri fundamentaĵo, respektanta la du signifojn de la specia epiteto, unue: plena de kernoj, due: flamruĝa. PIV bonvolas registri “grenat-kolora”, sed ne granat-kolora. *Sic!*
2. **Granito** devenas el *granitum marmor*, laŭvorte tradukenda kiel grajnehava marmoro, kvankam la plutona rokaĵo havas nenion komunan kun marmoro, krom la grajneca strukturo. La fundamentaĵo nature konservas la originalan *A*, sen zorgi ekz. pri la angla prononco kun la larĝa *E*.

H - Transirante el la lingvo latina al la greka (helena), mi ne povas preterlasi la fonemon *H*, kiujn mi traktis en miaj konsideroj jam multfoje. PIV klopodas, sen tre rimarkinda sukceso, laŭeble anstataŭigi tiun ĉi fundamentan fonemon per *K*. El la starpunkto nomenklatura frapas okulojn komparado de nomoj zoologiaj, en kiuj restas la fontolingva fonemo normale redonita per *H* (ekz. ĥaradrio, ĥelonio, ĥetognato, ĥironekto, ĥiroptero, ĥondrosteoj, ĥondrosomo, ĥordo) kun la botanikaj, kie la fontolingva fonemo konsekvence transformiĝis al *K* (ekz. akileo, alkemilo, ankuzo, karao, keiranto, kelidonio, kenopodio, klamidosporo). La malsimila, do nekohera redakto en ambaŭ sciencoj estas apenaŭ komprenebla.

Eĉ pli naŭze efikas la vortaro per la senpera najbareco de dolihoto kun “dolikocefalo”, same la komun-etimaj, sed vortare distancaj ĥondro- kaj “kondro-”. Ĉu malbona konscienco kaŭzis jenan registron: kondrosteo = ĥondrosteo? Tamen male: okaze de la fundamenta ĥemio oni senskrupule referencas al “kemio”, kiu laŭ PIV estas “moderna formo de ĥemio”. Kiu kriterio difinas la “modernecon”?

Nedezirinda estas ankaŭ konfuzo de malsamaj etimoj; ekz. kenozoiko rilatas al la greka *kainos* = nova, ĉar temas pri la geologia nov-epoko, dum ĥenopodio (PIVe “kenopodio”) ne rilatas al io nova, sed al *ĥen* = ansero; la germanoj nomas ĝin *Gänsefuß* = anseropiedo.

Principan diferencon inter la nekonfuzendaj ĥinino kaj kinino, ĥalkofila kaj kalkofila mi eksplikis jam en 1980. Tiaĵojn PIV mal-emas percepti.

OI, OE - La greka diftongo *OI*, latinigata per *OE*, normale aperas en Esperanto kiel *E*: celentero, celomo, ekologio, ekonomio, enotero k.t.p. Tamen, PIV registras jenajn kuriozaĵojn: “oestro”, “oestrodio”, kun la referenco al la normalforma estradiolo, “oestrogena”, “oestrono”. Kiu kontrabandis ilin en la vortaron?

EI - Ankaŭ tiu ĉi diftongo kondutas enigme en la kadro de PIV: kontraste al la internacia **pleistoceno**, jen ni renkontiĝas kun “plejstoceno” (en la preparata PIV-2 eĉ kun “plistoceno” Spite al la internacia **seismo** (greke *seio* = mi skuas) generiĝis “sismo”. En la ĵus menciita PIV-2 troviĝas epigenezo kiu ja inkludas la grekan prepozicion *epi* = post. Sekvas “epirogenezo”, ĝuste epeirogenezo (laŭ la substantivo *epeiros* = kontinento). Parenteze: La redaktoroj de PIV dankinde kompleksis disponigi al mi la geologian parton, sed per tio kontraŭvole malkaŝis, ke ili ne estas kompetentaj por prizorgi la scienca leksikon de Esperanto! Mi ne hezitas diri, ke la dua eldono de PIV estos tiurilate eĉ pli malbona ol la unua.

TS - Ne nur la latina kaj greka lingvoj estas perfortataj en PIV, kiu opinias, ke ĉiu fontolingva *TS* devas en Esperanton interpretiĝi kiel *C*.

En miaj materialoj pri PIV-2 troviĝas “smiconito”, ĝuste smitsonito. Temas pri mineralo nomita laŭ la ĥemiisto kaj mineralogo *J. Smithson*. Al simila “ĝenro” apartenas la PIVa gramnegativa bakterio

“rikecio”, ĝuste riketsio. Ĝi estas nomita laŭ la usona esploristo *H.T. Ricketts*. Tiu *S* devas interpretiĝi kiel la t.n. saksa genitivo, do havas nenion komunan kun la antaŭa *T*. Simile la rusojn konsternas la PIVa “Oĥocka” maro. Devas esti Oĥotska, laŭ la urbo *Oĥotsk*, kies *SK* estas adjektiva sufikso aldonita al la tribnomo *Oĥot*. Fine, la tribnomo estas derivita de la urbo *Oĥa*. Oni respektu la koherecon inter Oĥo, Oĥoto kaj Oĥotsko. En neniu el ili aperu *C*.

Konklude

Milojn da koherecoj en la scienca leksiko krude perturbis PIV. Tamen, por tiu ĉi modesta kadro eble sufiĉis kelko da avertaj ekzemploj. Nia planlingvo laŭeble klopodu restarigi dezirindan ordon, almenaŭ tian, kian atingas etnolingvoj.

Referencoj

- Kavka, J.* (1980): La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. – Kolekto de la seminariaj referaĵoj AEST (Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko), 93-100. *Ústí nad Labem*.
- Kavka, J.* (1996): Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature. 32 p. – *Kava-Pech, Dobřichovice*.
- Kavka, J.* (1999): Natursciencaj Terminoj en PIV (statistika sondo pri ties ĝusteco). – KAEST (1998), 85-91. *Kava-Pech, Dobřichovice*.
- Kavka, J.* (2000): Baza premiso por la scienca leksiko de Esperanto. – Scienca Revuo, Vol. 51 kajero 3 (n-ro 182), 39-43, *Eschwege*.
- Kavka, J.* (2001): Sciencaj mineral-nomoj en Esperanto. – Inter Ni, 186, 3. Nov-Skotio.
- Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.

Adreso de la aŭtoro

Dr. Josef KAVKA
Lužná 7 – Vokovice
CZ - 160 00 P r a h a 6
ĈEĤIO

Priaŭtora informo

Profesie: geologo. Fake: petrologo. Hobie: naturhistoriisto. Esperante: terminologo.

La formorto de lingvoj: ĉu bedaŭrinda ?

Ralph A. LEWIN

Enkonduko

Kelkaj lingvistoj plendas pri la neprecedenta malapero de minoritataj lingvoj tra la mondo (*Crystal*, 2000). Oni komparas tiun fenomenon kun la lastatempaj amasa ekstermo de bestoj. Kvankam sendube ekzistas paraleloj, mi, kiel biologo (sed ne lingvisto), deziras komenti pri gravaj malsimilecoj inter tiuj du fenomenoj.

Oni akceptu la ideon de kompari la diversecon de lingvoj kun tiu de la vivaĵoj. Lingvoj kaj vivaĵoj okupantaj malsamajn teritoriojn tendencas evoluigi kaj diversiĝi pli aŭ malpli same. Per similaj komputilaj programoj, oni povas krei por lingvoj, same kiel por plantoj aŭ bestoj, samspecajn filogenetikajn « arbojn » – komparu ekzemple *Keeling & Palmer* (2000) pri la evoluo de eŭkariotoj kaj *Gray & Jordan* (2000) pri la evoluo de aŭstraliaj lingvoj. Tamen, oni ne trophuŝu tian analogion, pro kialoj kiujn mi klarigos subsekve.

Komence, **amasaj estingoj** (kiel tiu kaŭzata de grandega meteorito, kiu koliziis kun la Tero antaŭ 65 milionoj da jaroj kaj supoze kaŭzis la ekstermon de la dinosaŭroj inter aliaj estaĵoj) estas katastrofoj, dum kiu malaperas **samtempe** multaj diversspecaj vivaĵoj. Kontraŭe, la plejmulto de **nuntempaj ekstermoj** – kiuj bedaŭrinde estas tro oftaj – estas tute apartaj aferoj. Tial mi preferus ne uzi la vorton “amas-ekstermo” por tiaj cirkonstancoj.

Oni povus demandi, ĉu ĉiu estingiĝo estas vere bedaŭrinda? Malmultaj el ni, mi supozas, priplorus la forpason de cimoj aŭ tenioj, kiuj bonŝance estas jam sufiĉe maloftaj en civilizitaj landoj. Kaj malmultaj el ni (krom eble kelkaj protozoologoj) bedaŭrus la ekstermon de la malaria parazito.

Biodiverseco / lingvodiverseco

Mi legis, ke en iuj indiĝenaj aŭstraliaj lingvoj ekzistas **manpleno da vortoj** por la diversaj grandaj larvoj de skaraboj, kiujn la indiĝenoj